Granda urbo

Vortoj kaj muziko de
Ĵomart Amzeev

Granda urbo, longaj stratoj,
ĉio trankviliĝas.
En brueto delikata,
en brueto delikata
nokto jam naskiĝas.

En fenestro ĉiu vivas
varma mola lumo.
Jam delonge mi ne timas,
jam delonge mi ne timas,
de krepusk' brakumon.

Rf - I: Jam delonge mi atendas
ion de vesperoj,
sed mallumo ne defendas
de atendsuferoj.

Noktan ŝaltos mi lampeton,
libron foliumos.
Kaj aûskultos sonkasedon,
kaj aûskultos sonkasedon,
rigardante lumon.

Vane serĉos mi respondon
por demando unu:
Ĉu feliĉon mi renkontos?
Ĉu feliĉon mi renkontos?
Trovos min fortuno?

Rf - I: Jam delonge mi atendas
ion de vesperoj
sed mallumo ne defendas
de atendsuferoj.

Jam vekiĝas urbo granda.
Min mateno juĝos.
Kaj forpelos noktan landon,
kaj forpelos noktan landon
horizonto ruĝa.